

# **Itala Ministerio pri Publika Instruado (Klerigad-Ministerio)**

*Komisiono pri la lingvo internacia (nomita Esperanto) Interministeria Dekreto - 29a de aprilo / 5a de oktobro 1993*

## **STUDO\***

*Romo, la 22an de decembro 1993*

### *R e s u m o*

<b>PREMISOJ</b>	<b>2</b>
<b>1. LA INTERNACIA LINGVO</b>	<b>4</b>
<b>1.1. La oficialaj agnoskoj</b>	<b>5</b>
<b>1.2. La internacia lingvo kiel lingvo-orientiga instruado</b>	<b>8</b>
<b>1.2.1. Kelkaj pedagogiaj eksperimentoj</b>	<b>9</b>
<b>1.3. Konkludoj</b>	<b>13</b>
<b>2. LA PROPONOJ</b>	<b>14</b>
<b>BIBLIOGRAFIO</b>	<b>15</b>

\* Publikigita en *Bollettino Ufficiale del Ministero della Pubblica Istruzione*, (Oficiala Bulteno de la Ministerio pri Publika Instruado), n. 21-22, 25 majo - 1 junio 1995, pp 7-43.

## PREMISO

La donitaĵoj pri la instruado de fremda lingvo, ankaŭ en ĉia antaŭnelonga enkonduko en la elementaj lernejoj, pruvas ke tiu instruado riskas fariĝi tutsimple instruado/lernado de la angla lingvo. Kiel oni povas rimarki el la raporto "Iniziativa di monitoraggio sulla riforma della scuola elementare" (Iniciatoj de monitorado pri la reformo de la elementa instruado) de la itala Klerig-Ministerio (p. 6), 73 procentoj de la klasoj, en kiuj ekfunkciis la instruado de la lingvo dua, elektis la anglan.

Malmulte utilis la ankaŭ teknikaj elturniĵoj por eviti similan reduktantan kaj danĝeran alrigardon al la instruado/lernado de la fremdaj lingvoj. Krom ne facile solveblaj problemoj pri okupado de instruistoj de aliaj lingvoj, el tio devenas ke:

- estas misnaturigita la humanisma kaj kultura aliro, laŭ la individuaj emoj, al la lernado de fremda lingvo (kiu implikas ekkonon de kutimoj, moroj, kulturo de iu popolo), motive de la 'neceso' lerni tiun lingvon kaj ne aliajn;

2 - estas preteratentataj kaj fakte neataj la gvidaj principoj Eŭrop-komunumaj de plurlingvismo, kiuj evidente, en la maniero kiel ili estas nun sekvataj, favoras unulingvismon, kaj la anglalingvan unulingvismon. Aliflanke, la ellernado de pluraj fremdaj lingvoj ne garantias la internacian komunikadon de ĉiu unuopulo kun ĉiuj, kio kontraŭe devus esti certigata, kiel rajto de ĉiu eŭropa civitano eliranta el la deviga lernejo;

- estas serioze endanĝerigita je estingiĝo, sekve de la unulingvisma rezulto, eĉ la gepatra lingvo mem. Lingvo estas praktike metita en kondiĉojn mem-estingiĝi, kiam en la infanaj lernejoj de la popolo ĉin parolanta, oni allasas la instruadon de fremda lingvo per la argumento, ke la lingvo, kiu vere valoras kaj valoros estas la angla lingvo, ne aliaj, eĉ ne la nacia lingvo mem. En tiuj kondiĉoj la angla lingvo ne povas ne superforti la nacian lingvon kaj do supreniri al la rango de lingvo unua. Fakte ja, inter lingvo supreniranta, kiel lingvo de la estanteco kaj de la estonteco, kaj lingvo dekadencanta, estanta lingvo de la pasinteco, nur povas venki la lingvo supreniranta.

Tiuj ĉi estas la fundamentaj kialoj, pro kiuj la enkonduko de fremda lingvo ne etna, sed aŭtentike internacia, estas hodiaŭ necesa.

## LA INTERNACIAJ LINGVOJ

La ideo, ke la problemojn de tutmonda lingva interkomunikado kaŭzatajn de la miloj da parolataj lingvoj oni povus ĉebaze solvi, konstruante universalan lingvon, vigle aperas en la Eŭropo de la 17a jarcento. Elstara karakterizo de la lingvoj, pri kiuj oni pensis ĉis la 19a jc., estis tio, ke pri ili oni rezonis esence laŭ terminoj de klasigado de ideoj, ĉar la naturaj lingvoj estis konsiderataj de la filozofoj kiel trompaj kaj neperfektaj.

Sed ekde la 19a jarcento la *logothètes*, por repreni neologismon de Roland Barthes, konkrete konstruas lingvojn, kaj la projektoj ne mankas: ili estas kalkulitaj je ĉ. 500 de Pierre Janton.<sup>1</sup>

Sen alveni ĉis tiom granda nombro, sen bezono de specialaj esploroj, oni povas listigi centon da lingvoj. La jena listo estas pli mallonga, ĉar ĉi atingas ĉis 1914, sed ĉi jam atestas intensan lingvokrean aktivecon inter 1879, dato de la invento de *Volapük* kaj 1914. Detale, en la daŭro de la unuaj dek kvar jaroj de tiu ĉi jarcento, oni nombras en tiu ĉi certe tre nekompleta listo pli ol du lingvojn ĉiujare: 1858, *Cosmoglossa*; 1868, *Universalglot*; 1879, *Volapük*; 1883, *Weltsprache*; 1887, *Balta*; 1887, *Lingvo Internacia* (Esperanto), *Spokil*; 1888, *Spelin*; 1889, *Anglo-franca*; 1890, *Mundolingue*; 1893, *Dil*; 1896, *Velparl*; 1898, *Dilpok*; 1900, *Lingua komun*; 1902, *Reformlatein*, *Universal Latein*, *Idiom neutral*; 1903, *Latino sine Flexione*, *Interlingua*; 1904, *Perio*; 1905, *Lingua internacional*; 1906, *Mondlingvo*, *Ulla*; 1907, *Ido*, *Lingvo internaciona*, *Apolema*, *Lingus european*; 1908, *Mez-voio*, *Romanizat*, *Dutalingue*; 1909, *Romanal*, *Italico*; 1910, *Adjuvilo*, *Nuv-esperanto*, *Reform-esperanto*, *Semi-latin*, *Perfect*; 1911, *Latin-esperanto*, *Latin-ido*, *Lingw adelfenzal*, *Simplo*, *Novi Latine*, *Molog*; 1912, *Reform neutral*; 1914, *Europeo*.

Sed ankaŭ aliaj lingvoj, etnodevenaj, estante sociaj fenomenoj ricevis, kiam tia bezono aperis, planitan kaj iamezure artefaritan formadon: la indonezia, la oficiala norvega lingvo kaj la nov-hebrea, lingvo de Israelo, sed ankaŭ lingvoj kiel la literatura germana, la itala, la svahila, kaj ankaŭ la franca kaj la angla formiĝis en artefarita maniero en iaj momentoj de sia historio en la fluo de la jarcentoj.

Estas interese observi ke la ideo pri *lingua universalis* ekaperas en la historia momento de la malsupreniro de la latina kiel vehikla lingvo de la eŭropaj elitoj, kaj enkarniĝas en multnombraj projektoj en alia historia momento, kiam la franca, kiu prenis la lokon de la latina, komencas mem sian malsupreniron en tiu sama rolo. En ambaŭ kazoj ni rimarkas tiun klopodon, radike solvi la problemojn de la internacia komunikado, kaj en la dua kazo ni vidas striktan ligon inter la apero de la



3



La unuaj lernolibroj de Esperanto: por Rusoj, Poloj, Francoj, Germanoj.

'fenomeno Esperanto' kaj tiu de la naci-ŝtatoj: la ideo mem de internacia lingvo aperas kiel respondo al la nacia (kaj lingva) dividiteco de Eŭropo.

Alia rimarko: la nombro de la konstruataj lingvoj ŝajnas pliiĝi ju pli oni alproksimiĝas al la Unua Mondmilito, kvazaŭ la projektoj provus forturni la katastrofon anonciĝantan je la politika horizonto.

Tiel Volapuko kaj Esperanto, la solaj lingvoj atingintaj ian sukceson, aspektas kiel alportantoj de ia mesaĝo de frateco, egalisma, internaciisma kaj pacisma.

Ŭuste en tiuj ĉi "valoroj" estas verŝajne serĉendaj la motivoj, kiuj igis diversajn landojn - en difinitaj historiaj momentoj - persekuti kaj kontraŭstari la uzantojn de la lingvo Esperanto: en la eksa Sovetunio, en Germanio, en Hispanio, en Portugalio kaj krome, dum la dua mondmilito, en la tuta teritorio okupata de la germana armeo, kaj ankaŭ en landoj kiel Āinio, Irano kaj Irako.

Volapuko, la unua artefarita lingvo elirinta el la projekta fazo atingante la praktikadan stadion, konis elanon tiom rimarkindan kiom mallongan.

4 Dek jarojn post ĉia apero, 25 gazetoj estis presataj en tiu lingvo, 283 societoj estis starigitaj, kaj ekzistis lernolibroj en 25 lingvoj. Naskiĝis akademio, kiu baldaŭ ekdiskutis pri reformoj. La nekompromisemo de la aŭtoro fiaskigis ilin ĉiujn kaj kaŭzis la skismon, sekvatan de diserio ekde 1889<sup>2</sup>.

Kaj Esperanto ricevis avantaĝon de tiu fiasko, por plenumi rolon necesigitan de la cirkonstancoj kaj ekokupi disponeblan lokon.

## 1. LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO

En la jaro 1887 Zamenhof, naskiĝinta en 1859, publikigas sian unuan libreton pri tio, kion li nomas *Lingvo Internacia*: la vorto *D-ro Esperanto* estas la pseŭdonimo kiun li uzas por subskribi sian tekston. Post du jaroj ekaperas la unua revuo, *La Esperantisto*; en 1894 Zamenhof publikigas vortaron, poste ekzercaron kaj fine, en 1905, aperas la *Fundamento de Esperanto*, teksto kiu resumas la gramatikon de la lingvo en dek ses regulojn.

Poste komenciĝas la internaciaj kongresoj: 1905, Bulonjo-ĉ-Marŭ; 1906, Ĉenevo; 1907, Kambriŭ; 1908, Dresdeno; 1909, Barcelono; 1910, Vasingtono; 1911, Antverpeno ktp. Āeestis 668 personoj en la unua kongreso, 3739 estis la aliĝintoj al la Pariza, en 1914 (kiu ne okazis kaŭze de la milito). La nombro de la esperantistoj regule kreskas, kvankam estas malfacile precize kalkuli la disvastiĝon de tiu diasporo. La Universala Esperanto-Asocio nombras hodiaŭ ĉ. 40.000 aliĝintojn, sed iuj eĉ kalkulas je 15 milionoj la nombron de la parolantoj de la lingvo. Āiel ajn, estas klare, ke Esperanto estas la sola vivanta lingvo universala<sup>3</sup>.

La *internacia* lingvo formiĝis surbaze de fundamentoj troveblaj ĉefe en la hind-eŭropaj lingvoj. Esperanto estas pli facile lernebla ol la ceteraj lingvoj, pronuncoas laŭ la skribo, la prononcreguloj estas fiksitaj, la gramatiko baziĝas sur 16 reguloj; per aldono de kvardeko da prefiksoj kaj sufiksoj oni povas kunmeti sufiĉe da vortoj por esprimi ĉion. Tia sistemo troveblas ankaŭ en ne-hindeŭropaj lingvoj. Strukture la lingvo Esperanto ne estas hind-eŭropa lingvo, kvankam la radikoj devenas de la hind-eŭropaj lingvoj; ĉis nun ĉi evoluis kaj plue evoluadas simile al la naciaj lingvoj.

Asocioj de esperanto-parolantoj kaj esperantistoj ekzistas kaj agas ne nur en ĉiuj Eŭrop-uniaj kaj tuteŭropaj landoj, sed ankaŭ en la ceteraj kontinentoj. Ekzistas ankaŭ fakaj esperanto-asocioj, pri diversaj temoj, regule kunvenantaj precipe okaze de kongresoj; esperanto-kursoj, diversnivele aranĝitaj (fare de la esperanto-asocioj mem, de lernejoj, de universitatoj) okazas ĉiujare en ĉiuj eŭropaj landoj kaj ankaŭ internaci-nivele; konstantaj Esperanto-centroj ekzistas en diversaj landoj kaj, en Eŭropo, en Francio, Italio, Svislando, Pollando, Bulgario ktp, dum en Vieno en la iama Imperiestra Palaco ekzistas Esperanto-Muzeo. Ilo de interesa formulo de internacia kunsociiĝo estas la *Pasporta Servo*, libreto kie publikiĝas nomoj kaj adresoj de esperantistoj el pluraj dekoj da landoj, kiuj pretas senpage gastigi aliajn esperantistojn. La stacioj Radio Āŭstria, Havano, Radio Bandeirantes (Brazilo), Litova Radio, Pekino, Pola Radio, itala Radio (RAI), Tallinn, Radio Vatikana elsendas en Esperanto (preskaŭ ĉiam kurt-onde).

Publikiĝis miloj da poeziaĵoj aŭ poemoj originale verkitaj en Esperanto. Inter la centoj da revuoj kaj gazetoj aperantaj, kelkaj havas literaturan karakterizon kaj regule publikigas novajn tekstojn

beletrajn kaj poeziajn. En la daŭro de la jaroj aperis konsiderinda nombro da romanoj originale verkitaj en Esperanto, kaj en tiu lingvo aperis verkoj el la plej diversaj sciencoj: pri politiko, sociaj problemoj, medicino, filozofio ktp.

Esperantistoj kunlaboras ekde antaŭ kelkaj jaroj ĉe la Poezia Festivalo en Roterdamo kaj en 1993, per la agnosko al la Esperanto-PEN-Klubo fare de PEN Club International, Esperanto ankaŭ oficiale eniras en la historion kiel literatura lingvo.

El eksperimentadoj oni konstatis ke eblas esprimi sin en ne-ambigua maniero pli facile en Esperanto ol en aliaj lingvoj. Provoj de tradukado montris ke Esperanto kiel pont-lingvo donis pli bonajn rezultojn kompare kun aliaj lingvoj uzataj en tiu rolo. Tial oni komprenas ke la Oficejo por Sistem-evoluigado (BSO) en Utrecht (Nederlando), siatempe finance subtenata de la Eŭropa Komunumo kaj de la Nederlanda Klerig-Ministerio, elektis Esperanton kiel pontlingvon por projekto pri aŭtomata translingvigo.

Tiu ĉi lingvo montriĝas tre taŭga por la Lingvo-Orientiga Instruado; pri tia rolo la plej profundigitaj esploroj kaj eksperimentadoj estas tiuj de la Instituto pri Pedagogia Kibernetiko de la germana Universitato de Paderborn, gvide de Prof-ro H. Frank. La kono de Esperanto - precipe en junaĝo - faciligas la lernadon de aliaj lingvoj. Krome ĉi helpas logike pensi. La lernado de Esperanto dum unu jaro liveras "pasivan konon" kiu igas alirebla ĉiun tekston tiulingvan, ĉu literaturan, ĉu sciencon.

### **1.1. LA OFICIALAJ AGNOSKOJ**

La unuan oficialan agnoskon la internacia lingvo ricevis de la Ligo de Nacioj (LdN).

La LdN, antaŭulo post la unua mondmilito en la jaroj 1920 de la Unuiĝintaj Nacioj (UN) post la dua mondmilito, ekde la komenco interesiĝis pri Esperanto kiel solvo de la jam tiam ekzistanta lingvoproblemo.

Propono de rezolucio estis prezentita dum la unua ĝenerala kunveno en 1920 kaj ĉi tekstas jene:

*'La Ligo de Nacioj, konstatante la lingvajn malfacilaĵojn, kiuj malhelpas rektajn rilatojn inter la popoloj, kaj la urĝan necesecon forigi tiun baron por helpi al bona komprenigado inter nacioj, sekvas kun intereso la provojn je oficiala instruado de la internacia lingvo Esperanto en la publikaj lernejoj de kelkaj regnoj, anoj de la Ligo de Nacioj; esperas, ke tiu instruado ĝeneraliĝos en la tuta mondo, por ke la aŭlandaj geknaboj sciu de nun almenaŭ du lingvojn, sian gepatran kaj facilan rimedon por internacia komunikado; petas la ĝeneralan sekretariaron prepari, por la venonta kunsido detalan raporton pri la rezultoj atingitaj en tiu fako.'*

Pro la forta kontraŭbatalo de la franca reprezentanto, kiu defendis la francan lingvon, "jam universalan en la tuta mondo de ĉi penso", la propono de rezolucio iris por plua pritrakto al speciala komisiono...

Dum la dua ĝenerala kunveno (septembro 1921), nova rezolucio estis adoptita sen ia kontraŭstaro, kiu enhavas jenan rekomendon:

*'La komisiono opinias, ke tiu problemo, je kiu interesiĝas ĉiam pli multaj regnoj, meritas atentan studadon antaŭ ol ĉi povas esti pritraktata de la kunveno. Ĉi estis jam resendita lastan jaron al komisiono, kiu prezentis mallongan raporton rekomendante, ke la ĝenerala sekretariaro enketu pri la jam faritaj eksperimentoj kaj pri la rezultoj atingitaj sur la kampo de faktoj. La komisiono proponas ke la temo estu enskribita sur la tagordon de la venonta kunveno, kaj ke la ĝenerala sekretariaro dume preparu plenan kaj dokumentitan raporton laŭ la senco montrita en la rezolucia propono...'*

En aprilo 1922 okazis en la palaco de la Ligo de Nacioj la internacia konferenco pri la instruado de Esperanto en lernejoj, kunvokita de la Instituto J.J.Rousseau (Universitata Lernejo de Pedagogia Scienco en Ĝenevo) kaj malfermita per bonvenparolado de la Liga Ĝenerala Sekretario sinjoro Eric Drummond, kiel "valora helpilo al la enketo". Ĉin partoprenis instruistoj de Esperanto el 28 landoj kaj oficialaj delegitoj de 16 registaroj.

La konferenco publikigis la jenan manifeston direktitan al la tutmonda instruistaro (István SZERDAHELYI, *Metodologio de Esperanto*, p. 313).

*Manifesto al la instruistaro tutmonda*  
Øenevo, la 20-an de Aprilo 1929

Ni, edukistoj el 28 landoj kaj oficialaj delegitoj de 16 registaroj, kunveninte en la Sekretariejo de Ligo de Nacioj en Øenevo, frate salutas niajn kunlaborantojn en la tasko lumigi la mensojn de la homoj.

Ni asertas nian konvinkon, ke la fundamento de la nuna bedaýrinda stato, en kiu la civilizita mondo troviðas, estas tiu malkompreno kaj malfido, kiu dividas la popolojn unu de la alia.

Ni asertas nian konvinkon, ke la sola certa kuracilo kontraý tiu æi malbono estas eduko al homeco kaj efektivigo de la principo de internacia alproksimigo, por kiu staras la Ligo de Nacioj.

Ni rigardas kiel unu el la plej valoraj kontribuoj al la solvo de la problemo de mondrekonstruo la internacian helplingvon Esperanton, kaj ni asertas nian konvinkon, ke æi flanke de la naciaj kultur-lingvoj devas fariøi parto de la eduka programo en æiu civilizita lando.

Ni deziras konigi al vi la rezultojn de nia sperto en la instruado de Esperanto en multaj diversaj lernejoj.

Ni konstatis, ke Esperanto estas tute sufiða por praktika uzado kiel internacia lingvo, por æiuj celoj parolaj aý skribaj, al kiu lingvo estas bezonata; krom tio æi posedas rimarkindajn ecojn, kiuj pruvas øian valoron, kiel ilo eduka.

Øi valoras kiel helpo por la øusta uzado de la gepatra lingvo. Tio montriðas per la plibonigo de la gepatralingva prononco kaj elparolo, pli bona elekto de vortoj, pli preciza scio de vortosignoj kaj pli klara kompreno de gramatikaj principoj.

Esperanto faciligas la akiron de lingvoj modernaj kaj klasikaj, faciligante la taskon kaj þparante tempon de la instruisto, klarigante la gramatikajn formojn, liverante internaciajn vortradikojn kaj kutimigante la mensojn de lernantoj esprimi sin en pli ol unu lingvo.

Laý nia opinio, Esperanto devas esti instruata al infanoj kiel unua lingvo post la gepatra, kaj enkondukata jam en la unuagradan instruprogramon. Øi provizus la lernanton, kiu devas frue eliri el la lernejo, per sufiða scio de dua lingvo, praktike uzebla. Øi montrus, æu tiuj, kiuj eniras duagradan instruon, posedas kapablon por plia lingvostudado, kaj æi sendus ilin al tiu lernado kun mensoj pretigitaj al tio. Øi ebligus, sekve, þparadon de tempo, kaj pli bonajn rezultojn en la ellernado de lingvoj. Lernantoj nekapablaj en la lingvostudado povos sin fordoni al pli konvenaj studoj.

Ni konstatis, ke la scio de Esperanto vekis æe niaj lernantoj pli realan konon kaj þaton de geografio, mondhistorio kaj eæ morala edukado; pli grandan kaj pli simpatian intereson pri fremdaj popoloj, pri ties kutimoj, literaturo kaj arto. Esperanto edukas infanojn al tutmonda paco kaj profundigas en ili la idealon de la Ligo de Nacioj. Tio æi efektiviðas precipe per interþanøo de leteroj, ilustritaj poþtkartoj kaj desegnaþoj inter infanoj diverslandaj, per legado de internaciaj gazetoj en Esperanto kaj per studado de fremdaj literaturoj. Lernantoj povas korespondi jam post kelkmonata studado. La avantaøo morala de tiu æi multlanda korespondado estas tre granda.

Per du unuhoraj lecionoj æiusemajne la lernantoj povas akiri en unu jaro tian praktikan konon de la lingvo, kian en iu alia lingvo estas tute neeble atingi en 3 jaroj.

Ni submetas æi tiun manifeston al via serioza konsiderado, kaj kore rekomendas al vi akceli la instruadon de Esperanto en via lando, ne nur pro øia utilo por komerco, scienco kaj ceteraj fakoj de internacia agado, sed ankaý pro øia valoro morala, kiel incitilo al tiu amika interrilatado de la popoloj de l' mondo, kiu estas la vera celo de la Ligo de Nacioj.

Por la tria øenerala kunsido de la Ligo en septembro 1922, la raporto pri la enketo estis tute preta: "Esperanto kiel internacia helpa lingvo". Øiaj resumaj konkludoj estis jenaj:

El la enketo entreprenita de la sekretariaro øenerala laý decido de la dua kunveno de la Ligo de Nacioj, rezultas, ke:

1. Lasante flanke la demandon pri diplomata lingvo, la bezono je helpa lingvo por rektaj internaciaj rilatoj þajnas esti æie vigle sentata.

2. La plimulto de l' eminentaj sciencaj aý komercaj korporacioj kiuj studis la problemon, deklaris sin favoraj al lingvo neýtrala kaj simpligita, kiu neniel atencu la centjaran prestiøon de la naciaj literaturaj lingvoj, kaj ili øenerale rekomendas Esperanton.

3. Esperanto ĵajnas esti efektive unu el la plej perfektaj, verĵajne la plej simpla kaj aĵuokaze la plej disvastigita el la proponitaj konvenciaj lingvoj.

4. Esperanto taĵgas por plenumi la rolon de internacia lingvo helpa, kaj abunda uzado skriba kaj parola donis al oĵi ecojn de lingvo vivanta kaj fleksebla, jam kreskinta kaj kapabla ankoraĵ pli-  
aĵoĵi.

5. Esperanto estas instruata aĵu devige, aĵu laĵdezire en ĵtataj lernejoj, elementaj aĵu duagradaj, de 17 regnoj laĵ leoĵaj artikoloj, ministraj dekretoj aĵu decidoj de urbestroj.

6. Eksperimentoj faritaj pruvas, ke Esperanto estas tre facile lernebla, aĵar infanoj eĵropaj kaj amerikaj lernas oĵin en unu jaro per du horoj aĵusemajne kaj infanoj el Ekstrem-Oriento en du jaroj per sama nombro da lecionoj semajne, dum ili bezonas ses studjarojn kun kvar oĵis kvin horoj semajne por akiri alian eĵropan lingvon. Por plenaouloj la necesa tempo estas ofte pli mallonga: 25 oĵis 40 lecionoj sufiacoas oĵenerale.

7. Esperanto ne pli ĵarous la lernejojprogramojn kaj ne konkurencas la naciajn kulturajn lingvojn, aĵar la sperto montras, ke oĵi kontraĵe helpas studi ilin kaj gajnigas tempon kiel logika enkonduko al latina, greka kaj modernaj lingvoj.

8. La porlernejaj estraroj instruigantaj Esperanton ĵatus ke oĵia stabileco estu garantiata per interĵtata rekono ebliganta la Esperantistan Akademion kontroli la normalan kreskon de la lingvo dume konservante daĵre oĵian unuecon.

9. La disvastigo de Esperanto estas konsiderata de pluraj registaroj kiel grava progreso de civilizado, sed oĵia deviga instruado en lernejoj dependas antaĵ aĵio de ia interĵtata interkonsento, garantiata, ke sufiaco vasta nombro da regnoj estas pretaj fari same.

10. Aĵstrio, Bolivio, Brazilo, Aĵinio, Danlando, Egipto, Hungario, Japanio, Norvegio kaj Nov-Zelando jam sciigis la internacian oficejon de la Universala Telegrafa Unio, ke ili estas pretaj konsenti la allason de Esperanto apud la naciaj lingvoj por internaciaj komunikoj.

11. La uzo de Esperanto ĵajnas disvastigi spiriton de internacia solidareco tute konforma je la celo de la Ligo de Nacioj...'

La raporto pri "Esperanto kiel internacia helpa lingvo" estis disdonata al la oĵenerala kunveno kaj submetata al ekzameno de oĵia kvina komisiono (pri sociaj kaj homaraj aferoj). Tie okazis tre vigla diskutado. La franca delegito, senatano Reynald, estis persone simpatiema, sed la instrukcioj de lia registaro estis absolute kontraĵaj. La ministro de publika instruado, L on B erard, estis ĵus malpermesinta en aĵuj francaj lernejoj instruadon aĵu propagandon por Esperanto, kiel danora ilo de internaciismo kaj konkurenco al la rolo de la franca lingvo en la mondo. La franca delegito proponis resendi la tutan aferon al la komisiono por intelekta kunlaborado por eviti tujan decidon... Pro timo al la grandaj potencoj, 18 kontraĵ 8 voaĵonis por la franca prokrasta propono resendi la punkton pri lernejoj al la intelekta kunlaborada komisiono... Sed, por ne ofendi la Aziajn kaj malgrandajn Eĵropajn landojn videble simpatiantajn, oni unuanime voaĵonis oficialigon de la raporto pri la faktoj...

Lord Cecil subtenis la oficialigon de la raporto, kiun li konsideris "kiel grandan sukceson por Esperanto" kaj konsilis al la Esperantistoj kura e daĵrigi sian laboron... "La intelekta komisiono devos memori, ke mondlingvo ne estas bezonata nur de intelektuloj, sed antaĵ aĵio de la popoloj mem."

"Kiam kunsidis la kvara oĵenerala kunveno de la Ligo en septembro 1923 la franca registaro aparte instrukciis delegiton Jacques Bardoux utiligi la rezolucion de la intelekta komisiono por definitive elpuĵi Esperanton. Li do prezentis oĵin en la kvina komisiono sub formo de liga rezolucio, rekomdante la studon de fremdaj lingvoj prefere al lerno de artefarita. Sed alinaciaj delegitoj protestis. Pluraj klarigis al li, ke ili ne volis insisti pri la Esperanto-afero por ne malplaaĵ al la franca registaro, sed ke ili tute ne povus akcepti ian rezolucion kiu ĵajnus iel ajn kontraĵi Esperanton, aĵar tiu movado havas multajn amikojn en ilia lando. Ea la britaj delegitoj avertis lin, ke ili kontraĵbatalus la rezolucion.

Tiam sinjoro Bardoux retiris oĵin kaj tiel la opinio de la intelekta komisiono estis nek konfirmita, nek akceptita de la Ligo de Nacioj mem, kiu restis aĵe la raporto adoptita en 1922, konstatanta per faktoj la valoron de Esperanto kaj oĵian vivan rolon"<sup>4</sup>

El aĵi konciza raportado pri la Esperanto-dosiero en la LdN evidentiacoas, ke jam antaĵ 70 jaroj ekzistis konscio pri lingvo-problemo; ke fakuloj jam tiam spertis la pedagogian valoron de Esperanto;

ke ne sufiĉas pravi por sukcesi, ĉar politikaj, ekonomiaj, naciismaj kaj hegemoniaj motivoj ludas gravan rolon eĉ por kontraŭstari fakajn konkludojn.

Tamen la hegemonio de iuj nacioj kaj de ties lingvoj ne estas eterna, ĉar ligita al politika kaj ekonomia potenco. La franca lingvo grandparte perdis sian internacian prestiĝon kaj influon profite al la angla, kiu nun defendas sian propran hegemonian kaj politikan pozicion malprofite al la franca kaj al la eterne perdantaj "malgrandaj nacioj kaj lingvoj".

Postsekvanto de LdN estis la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj kaj aparte Unesko. En 1954 la Plena Asembleo de Unesko en Montevideo aprobis rezolucion kiu substrekis la signifon de Esperanto por alproksimigo de la popoloj. Laŭ tiu rezolucio la rezultoj atingitaj pere de Esperanto estas plene konformaj al la celoj kaj idealoj de Unesko. Poste, en 1985, la Plena Asembleo de Unesko, en Sofio, denove konfirmis la signifon de Esperanto kaj substrekis la gravan progreson atingitan en la kampo de la reciproka kono de la popoloj kaj de la diverslandaj kulturoj. En la rezolucio oni invitis sekvi la disvolvigon de Esperanto kaj oni petis la membro-ŝtatojn antaŭenigi la studojn de la problemoj pri la lingvoj kaj pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj en la superajn klerigejojn.

### 1.2. LA INTERNACIA LINGVO KIEL LINGVO-ORIENTIGA INSTRUADO

Tre interesa - precipe konsiderante ke la nombro de la Eŭropaj lingvoj - anstataŭ malpliigi - kreskas (oni parolos ankaŭ litove, latve, estone ktp.) aspektas la lingvodidaktikaj ecoj de la internacia lingvo: funkciante kiel "lingvomodelo", kiel "mezur-unuo de la lingvoj", ĉi - se lernita antaŭ iu ajn fremda lingvo - plifaciligas ties postan lernadon, kun tempogajno.

La ideo foruzi iom da tempo, por poste regajni multe pli da ĉi, estas utiligata ĉefe en la didaktiko de la sciencoj: antaŭ ol instrui la studobjekton mem en ĉia tuta komplekseco, oni prezentas ties modelon pedagogie taŭgan.

En kurso pri biologio, ekzemple, oni uzas kiel modelon homan skeleton laŭcele konstruitan, kompletan, regulan, sen la misformiĝoj kaj difektoj de la veraj skeletoj, disigeblan, por ke oni povu aparte observi la diversajn konsistigajn elementojn, kvankam en la realo ili ne estas disigebblaj.

Por pli konkrete komprenigi la efikon de lingvodidaktika propedeŭtikeco de la internacia lingvo, eblas uzi la jenan ekzemplon:

- oni observu la ĉi-apudan bildon: ĉi enhavas serion da signoj;

- por enmemorigi tiujn ĉi signojn kaj ilian sinsekvon en la tuto, infano bezonas almenaŭ du minutojn, sed aparta *prepara instruo* el ne pli ol 5-6 sekundoj povas plifaciligi la lernadon, tiel ke ĉiu ajn povos lerni tiun ĉi serion da signoj, en la ĉusta vicordo, en ĉirkaŭ 10 sekundoj;

- la aparta propedeŭtika instruo konsistas el la jena informo: *ĉiuj signoj estas simetriaj: sufiĉas ekzameni nur la dekstran duonon, do kovri la maldekstran duonon de la kolumno, pere de paperfolio;*

- danke al tiu ĉi mallonga informo, oni tuj vidos ke la ok nekovritaj signoj estas nenio alia ol la unuaj ok bazaj numeroj.


Tiel en ĉirkaŭ **10 sekundoj** oni gajnis almenaŭ **100 sekundojn** en la lernado.

Ĉe la Instituto pri Pedagogia Kibernetiko de la Universitato de Paderborn en Germanio, ankaŭ por la lernado de fremdaj lingvoj oni studis kaj eksperimente konfirmis similan metodon.

La propedeŭtika instruado disvolvigita en tiu Instituto preparas la lernantojn ekkonscii pri la esencaj karakterizoj de la lingvoj; ĉi uzas kiel modelon la internacian lingvon esperanton, t.e. lingvo simpla kaj klarstruktura, tute regula kaj, danke al ĉia aglutineco, disigebla laŭ kunmetebblaj morfologiaj eroj. T.e. modelo facile asimilebla kaj disvolviganta la kapablon lerni aliajn lingvojn.

Jam antaŭ la eksperimentoj faritaj de prof. Helmar Frank en Germanio, similaj esploroj estis faritaj en Hungario de I. Szerdahely, en la Scienca Universitato de Budapeŝto. Grupo da lernejoj, kies gepatra lingvo estis la hungara, lerninte esperanton dum du jaroj en la 3a kaj 4a klaso de la unuagrada lernejo, estis dividita, por komenci la lernadon de la rusa, de la germana, de la angla kaj de la franca.

Laŭ la rezultoj, la akiro de la rusa lingvo estis faciligita de la antaŭa studo de





esperanto laŭ la mezuro de 25%; la redukto de malfacileco estis de 30% por la germana, de 40% por la angla kaj eĉ de 50% por la franca. Alivorte la infanoj ricevintaj la preparan instruadon atingis rimarkinde pli bonajn rezultojn ol la samaĝuloj ne ricevintaj tian enkondukon al la fremdaj lingvoj.

Tiun sistemon de prepara instruado oni praktikis ankaŭ en Germanio, kun tre pli granda nombro da lernantoj, sed nur cele al plifaciligado de lernado de la angla. Rezultis ke, post dujara lingvo-orientiga instruado pere de la *internacia* lingvo, la avantaĝo estis de ĉ. 30%.

La eksperimentoj faritaj kaj plurfoje ripetitaj en Paderborn iris eĉ preter tio:

La lernantoj restis dividitaj en du konkurencaj grupoj. Unu komencis la lernadon de la angla lingvo en la 3a element-lerneja klaso (A), la alia kontraŭe sekvis la peresperantan preparan instruadon kaj komencis la lernadon de la angla nur en la 5a lernoĵaro (B). La esperanto-programo postulis entute 160 horojn, kio povas ĵajni grandega tempoperdo, sed, laŭ la finaj rezultoj de la 7a lernoĵaro, la B-grupo atingis en la lernado de la angla lingvo la saman nivelon kiel la A-grupo, kaj en la 8a jaro eksuperis ĝin. Alivorte la rezultoj de la prepara instruado gajnis pli multe da tempo ol kiom ili perdis por la preparo.

La konsiloj de la fakuloj pri kibernetiko aplikata al pedagogio kaj al instruado de fremdaj lingvoj estas la jenaj:

1. La lingvoinstruado ekiru jam en la elementa lernejo, komencante je la aĝo de 8 jaroj per dujara esperanto-instruado.

2. Post la enkonduko de la fremda lingvo Esperanton oni utiligu en la instruado de iu lernobjekto, ekzemple geografio, kaj kiel interlerneja komunikilo (per korespondado).

3. Oni klopodu kunordigi la necesajn elpaŝojn en ĉiuj landoj de la Eŭropa Komunumo por certigi pli facilan lingvan interkomprenadon inter la civitanoj.

#### **1.2.1. Kelkaj pedagogiaj eksperimentoj**

Estas interese rimarki kiom da pedagogiaj eksperimentoj okazis, kaj en kiom da malsamaj lokoj, en la tempodaŭro. La jenaj estas la plej signifaj:

##### *Mezgrada lernejo por knabinoj en Bishop Auckland (GB)*

Jaroj: 1918-1921

Celoj: esplori ĉu la antaŭa lernado de Esperanto plifaciligas la postan lernadon de la franca kaj germana lingvoj.

Konkludoj:

- la racia kaj simpla gramatiko de Esperanto konsistigas, speciale por malpli talentplenaj infanoj, ponton, kiu ebligas pli facilan transiron al la komplika gramatiko de la franca kaj germana.
- ĝi videbligas la signifon de la gramatikaj terminoj;
- ĝi klare indikas la signifon de gramatikaj finaĵoj;
- ĝi alkitimigas la infanojn al la ideo de parenceco inter vortoj, vortkonstruo kaj derivaĵoj;
- Esperanto enkondukas la lernantojn en la internacian vortrezoron.

Raportoj: d-ino Alexandra FISHER: *Modern languages by way of Esperanto*.

*Pri eksperimento farita en Bishop, Auckland (GB) en la jaroj 1918-21*, en IPR, 1931

##### *Unuagrada episkopa lernejo de Auckland (NovZelando)*

Jaroj: 1922-1924

Celoj: kompari la lernfacilecon de Esperanto kun tiu de la franca.

Raporto: artikolo en Enciklopedio de Esperanto, 1-a volumo, p. 436 pri la pedagogia valoro de Esperanto.

##### *Wellesley College, departemento de psikologio (Ohio, USA)*

Jaroj: 1924

Celoj: esplori ĉu "sintezaj" lingvoj estas pli facile kaj rapide lerneblaj ol etnaj lingvoj. Komparo inter Esperanto kaj la dana.

Konkludoj: la Esperanto-lernantoj akiris pli bonajn rezultojn ol la lernantoj de la dana, i.a. pro la interna strukturo de Esperanto kaj pro la intereso kaj entuziasmo, kiujn Esperanto vekis en la menso de la lernantoj.

Raporto: Christian RUCKMICK: *The Wellealey College Danish-Esperanto experiment.*

*Columbia University, New York (USA)*

Jaroj: 1925-1931

Celoj: esplori ĉu kaj kiom planlingvo estas pli facile lernebla ol etna lingvo. Noto: la eksperimenton organizis, laŭ komisiono de IALA (*International Auxiliary Language Association*) d-ro Edward Thorndike, direktoro de la sekcio psikologio de la Instituto por eduka esplorado de la *Columbia University*.

Konkludoj:

- eblas al mezuma studento kompreni skriban kaj parolan Esperanton en 20 horoj pli bone ol li(ŝi) komprenas la francan, germanan, italan aŭ hispanan post 100 horoj da studado;
- 5 studhoroj por lerni la germanan havas preskaŭ neniun efikon; 5 horoj da E-studado sufiĉas por doni ĝeneralan ideon pri la tuta E-gramatiko;
- ĝenerale, en tempolimo de dek ĉis cent studhoroj, la rezultoj akiritaj post lernado de sinteza lingvo verŝajne estas kvin ĉis dekkvin-foje pli bonaj ol tiuj post lernado de etna lingvo, depende de ties malfacileco.. (p. 6-7 de la raporto de Eaton);
- ĉe parolantoj de la angla la rezultoj en la studado en la latina, la germana kaj la franca estas pli bonaj, se ili antaŭe lernis planlingvon kiel propedeŭtikan enkondukon (p. 27-30 de la sama raporto).

Raporto: Helen S. EATON: *Language Learning. Summary...*

*Public Highschool, New York (USA)*

Jaroj : 1934-1935

Celoj : esplori la influon de unusemestra lernado de Esperanto sur la posta lernado de la franca kaj paralele sur la gepatra, la angla.

Raporto: Helen S. EATON: *An Experiment in Language Learning.*

*Provincial Grammar School, Sheffield (GB)*

Jaro: 1947-1951

Celoj: kontroli ĉu vere Esperanto estas taŭga enkonduko al la lernado de la franca lingvo.

Konkludoj: Resume, oni do povas konkludi, ke ĉe la malpli inteligentaj lernejoj tiuj, kiuj dediĉis unu jaron al Esperanto, pli bone sukcesis en la franca lingvo je la fino de kvar jaroj, sen pli da tempo por la franca dum la 3 jaroj. La pli inteligentaj lernejoj tamen pli bone sukcesis en la franca lingvo, se ili komencis per tiu lingvo. Tiuj, kiuj komencis per Esperanto havis pli bonan "pasivan" scion, kaj tiuj, kiuj komencis per la franca lingvo, akiris pli bonan "aktivan uzadon".

Raportoj:

J.H. HALLORAN (docento pri edukado ĉe la Universitato de Sheffield): *A four year experiment in Esperanto as an introduction to French.*

F-ino V.C. NIXON: *Lastatempaj eksperimentoj pri Esperanto en lernejoj.*

*Egerton Park School, Denton (Manchester, GB)*

Jaroj: 1948 kaj sekv.

Celoj: Esplori, por malpli inteligentaj gelernejoj, ĉu antaŭa lernado de Esperanto plifaciligas la lernadon de la franca.

Konkludoj: Infano povas lerni tiom da Esperanto dum proksimume 6 monatoj, kiom da franca lingvo dum 3-4 jaroj. ... Se ĉiuj infanoj lernus Esperanton dum la unuaj 6-12 monatoj el 4-5-jara franclingva kurso, ili multe gajnus kaj nenion perdis.

Raporto: Norman WILLIAMS (lernejestro): *Report on the teaching of Esperanto from 1948 to 1965.*

*Mezgrada lernejo en Somero (Finnlando)*

Jaroj: 1958-1963

Celoj: esplori kiel progresas la studado de Esperanto, kaj ĉu tiu ĉi helpas aŭ malhelpas la lernadon de la germana.

Noto: la eksperimento okazis sub la kontrolo de la Ministerio pri Instruado.

Konkludoj:

- la lingvosocio atingita en Esperanto evidente estis tia, kian oni ne povus atingi per iu ajn alia fremda lingvo;
- oni konstatis la nekontraŭdireblan superecon de la akirita uzo-kapablo rilate la germanan lingvon, æ la E-lernejanon;
- la rapidaj rezultoj akiritaj en la E-instruado naskis en ili kuraŝon kaj memfidon;
- la kapablo akcepti novajn formojn de sinesprimo jam subkonscie helpas al ili la alproprigon de nova fremda lingvo.

Raportoj:

J. VILKKI, V. SETÄLÄ: *La eksperimenta instruado de Esperanto en la geknaba mezgrada lernejo de Somero (Suomio)*;

V. SETÄLÄ: *Vizito al la eksperimenta lernejo en Somero, Finnlando*.

#### *Universitato Eötvös Lorand, Budapeŝto (H)*

Jaroj: 1962-1963

Celoj: kompari, en tri klasoj de mezgrada lernejo, la lernrezultojn de Esperanto kun tiuj de la rusa, la angla kaj la germana.

Konkludoj:

Por hungaraj infanoj, la rezulto-koeficientoj, konsiderante la atingendajn lernocelojn, aspektas jene: por la rusa 30%, por la germana 40%, por la angla 60% kaj por Esperanto 130%. "Tiuj indikoj perfekte pravas la unuajn konstatojn de prof. Barczi: inter la cirkonstancoj de lerneja lingvoinstrado Esperanto estas la sola fremda lingvo, kies instrucelo estas efektivebla." (Szerdahelyi, 1970, citita en Lobin, p. 39)

Raportoj: SZERDAHELYI István, universitata docento): *La didaktika loko de la Internacia Lingvo en la sistemo de lernejoj studobjektoj*; Günter LOBIN: *Die Internacia Lingvo als Bildungskibernetisches Sprachmodell*, p.59.

#### *Internacia pedagogia-didaktika eksperimento, 1-a regiono*

Jaroj: 1971-1974

Organizanto: La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Kunlaboris: 2 klasoj el Bulgario, 9 el Hungario, 5 el Italio, 6 el Jugoslavio.

Celoj:

- pruvi ke, en normalaj instrucirkonstancoj, Esperanto estas pli facile lernebla ol aliaj lingvoj;
- esplori, æ la lernado de Esperanto pliriĝigas la ĝeneralan lingvistikan komprenon, danke al kiu oni atingas pli bonan komprenon de la gepatra lingvo;
- esplori, æ Esperanto kiel internacia kaj neŭtrala lingvo posedas bone uzeblajn pedagogiajn kvalitojn kaj sekve plifaciligas la lernadon de aliaj lingvoj;
- pruvi ke jam dum la lernado Esperanto estas diversmaniere uzebla pli ol aliaj fremdlingvoj.

Raportoj:

